MONATA REVUO DE FLANDRA ESPERANTO-LIGO
MAANDBLAD VAN VLAAMSE ESPERANTO-BOND

JARKOLEKTO
JAARGANG 2 N° 4 MAJO/JUNIO 1982

15 JUNI 1982



# Informilo

VERANTW. UITGEVER
RESPONDECA ELDONANTO JAN BOVENDEERD, SPEELTUINLAAN 14, B-2510 MORTSEL

INFORMILO

Kadrogazeto. Aperas ĉiu-monate, krom en julio kaj aŭgusto.

Abono : BF 100,- jare

FEL - ŜPARKONTO

FIKSDATAJ MONDEPONOJ

Minimumaj sumoj : BF 5.000,-

Minimuma periodo : 2 jaroj

- ĉu per pago en unu el la kontoj :
  402-5510531-55
  000-0265338-43
  menciante : DEPONO
- ĉu rekte al la Direktoro de ESPERANTO-CENTRO ANTVERPENO

LIBRO-SERVO SONORILO
Doornstraat 22
2610 WILRIJK
Direktoro : Monique VEREECKEN
Telefono : 031/27 24 05
Kontoj : 000-0152140-44
320-0342460-23

FLANDRA ESPERANTO-LIGO
Arsenaalstraat 5
2000 ANTWERPEN
Telefono : 031/16 05 05
Direktoro : Paul PEERAERTS

FEL-estraro

Edward SYMOENS, Putsesteenweg 131 A
2180 KALMTHOUT
031/66 62 66
prezidanto, estrarano pri informado, planado, agado

Roger DE SCHEPPER, Doornstraat 22
2610 WILRIJK
031/27 24 05
vic-prezidanto, estrarano pri financplanado

Jules VERSTRAETEN, St Bernardsestwg 1078
2710 HOBOKEN
031/27 66 43
estrarano pri financoj

Jan BOVENDEERD, Speeltuinlaan 14
2510 MORTSEL
031/49 50 06
ĝenerala sekretario, estrarano pri administrado kaj edukado

Fernand ROOSE, St Klaradreef 59
8000 BRUGGE
050/33 19 81
estrarano pri kulturo, respondeculo por Okcident Flandrujo.

Marie Thérèse HENQUINEZ, Lipsestraat 166
2991 TILDONK
016/23 61 90
respondeculo por Brabanto.

Guido SCHROEYERS, Helzoldstraat 113
3538 HELCHTEREN
011/53 64 10
respondeculo por Limburgo

Kristin TYTGAT, St Hathebrandstraat 8
2510 MORTSEL
031/49 50 24
Kontaktoj kun la junularo (FLEJA)



En la antaŭa numero de INFORMILO, ni atentigis pri tio, ke FEL-estraro devis eniri la Lokan Kongresan Komitaton por kunhelpi en la sukcesigo de la estonta Universala Kongreso.

Tio ebligas al ni ĉeesti la komitatkunsidojn kaj raporti pri ili.

Jen, do, superrigardo de la kunsido de sabato 17 04 1982 en Esperantodomo en Antverpeno.

Ĉeestis : S-ro Deputito F. Piot (FP), prezidanto; S-roj E. Symoens (ES), vic-prezidanto; R. De Schepper (RDS), sekretario, D. Masterman (DM), KKS = Konstanta Kongres-Sekretario; S-inoj E. Kehlet (EK), UEA-estrarano pri kongresoj; R. Van Herck (RVH), loĝiga servo; S-roj F. Luyten (FL) kaj E. Paesmans (EP), filatelio; F-ino A. Tilmont (AT), informa servo; S-roj P. De Smedt (PDS), ekskursoj; W. De Smet (WDS), estrara membro kaj J. Bovendeerd (JB), kongresejo.

S-ro Piot petas S-ron Symoens prezidi la kunsidon.

1. Unualoke, la diversaj komitatanoj raportas pri sia laboro.

1.1.1. RDS ricevis de la urbo Antverpeno interesan oferton por la ekskurso en la urbo, nome BF 4.700,- ĉio inkluziva anstataŭ BF 5.000,- + AVI

1.1.2. De la fervojo envenis diversaj demandoj.

1.1.3. Rilate la buĝeton, li opinias, ke ĝi devas esti ensendita pere de FEL. Ĝi devas esti ensendita 3 monatojn antaŭ la komenca dato de la manifestacio, do antaŭ 24 04 1982.

Tio ĉi okazis ĝustatempe.

1.2. Loĝiga servo (RVH)

1.2.1. Fakte ŝi kolektas litojn. Ŝi trovis tranokteblecojn en iu lernejo por po BF 100,-, matenmanĝon inkluzivan.

1.2.2. DM opinias, ke mendintoj devas esti loĝigataj en konvenaj ĉambroj. Nur kiam ne eblas kontentigi ilin, oni uzu tiujn aliajn tranokteblecojn.

1.2.3. Li konfesas, ke en la mendoslipo li forgesis mencii la alven- kaj forirdatojn. Eblus zorgi pri tio en la konfirmilo.

1.2.4. DM proponas rezervi 200-o da litoj en malmultekosta loĝejo por kongresanoj el nepagipovaj landoj.

1.2.5. RVH opinias tamen, ke mendoj de tiaj loĝeblecoj devas esti respektataj, komreneble.

1.2.6. La nemenditaĵoj devos esti redonitaj al la posedantoj fine de majo. Ŝi tamen retenos kvanton da litoj.

1.2.7. RVH ankaŭ atentigas pri tio, ke antaŭ 01 05 82 devos esti pagita 20 % de la rezervitaj litoj. Tamen multe da mendintoj ankoraŭ ne pagis.

DM opinias, ke UEA devos prizorgi tion.

1.2.8. La Turisma Servo de Antverpeno transdonas al ŝi demandojn kiujn ili ricevas de rekte-mendintoj. Tamen, ŝi timas, ke tiuj personoj ne ĉiuj pagis la kongreskotizon. Ĉu do ŝi povas akcepti ilin ?
Laŭ RDS temas pri delegitoj kiuj timas, ke mendoj pere de LKK estas pli multekostaj ol rekta mendo ĉe Turisma Servo.
DM respondecos pri la tiurilataj respondoj.

1.2.9. Konfirmiloj ankoraŭ ne ekzistas. Projekto estos preparita.

1.3. Filatelajoj (FL kaj EP)
FL antaŭmetas projekton de poŝtmarkstampo por la kongresa periodo. La unua-taga stampo (rilate al la antaŭvendo en junio) estas akceptita de la poŝtaj servoj. La kongresstampo estos kiel eble korektita kaj pritraktata en la kunsido de 14 05 82.

1.4. Informa servo (AT)
AT prezentas kvanton da insignoj/ŝildetoj kiuj, ĉu ne taŭgas, ĉu estas tro multekostaj. Ŝi proponas alian solvon, kiu estos ebla kunlabore kun la junularo. Temas pri buton(eg)oj, kiuj povas esti preparitaj por po BF 15,- ĉio inkluziva. Ili plie estas pretigeblaj ĝis la lasta momento. Ŝi prezentas projekton, kiu ne nur servus kiel insigno, sed ankaŭ kiel samtempa reklamilo/varbilo.
Ŝia propono akcpetiĝas, post kelkaj korektoj.
AT okupiĝas pri tio.

1.5. Gazetara servo - la respondeculo (Ivo Durwael, ne ĉeestas pro feriado)

1.6. Art-programo (DM)

1.6.1. PDS, kiu alvenos nur posttagmeze, anoncis 3 sin proponintajn kunlaborantojn.

1.6.2. Nuna stato :
UEA-estraro aprobis, ke ni rajtu pagigi enirbiletojn en Teatro Arenberg sed ne por tio, kio okazos en la kongresejo mem. Li proponas unu senpagan bileton kun elektebleco el la tuta serio kaj arbitran prezon de ekz. BF 100,-

1.6.3. La programo : 2 pupteatraj ludoj kaj 3 teatrajoj.
Tiu programo tamen estas ankoraŭ hipoteza, ĉar ankoraŭ ne konfirmita.

1.6.4. Ĉar la teatra kapacito estas 800 personoj, li proponas dividi la teatran vesperon en 3 partojn.
Krom la 2 pupteatraj ludoj proponiĝis :
- el Bulgario : "Kabineta Krizo"
el Francio (TESPA) : "Sen Eniro" kaj "Evento" (mallonga)
- el Jugoslavio : "Gastamo" (3-a premio el la Brazilaj beletraj konkursoj)



- el Rumanio : "Metamorfozoj" (ĉefaĵo).
Tamen ĉi tiu lasta superas la buĝeton, sed estos verŝajne aranĝebla.

1.6.5. Ekspozicio pri "paperaj eltondaĵoj" el Pollando estas akceptita de la Muzeo Etnografia de Antverpeno de 24 07 ĝis 31 08 1982.

1.6.6. DM proponas iom ŝanĝi la Arenbergan programon kaj okazigi la nacian vesperon je dimanĉvespero, la teatraĵon je merkredo, la muzikvesperon je ĵaŭdo.
La plej granda manko por la nacia vespero estas belgaj artistoj, asertas RDS. Temas pri artistoj proponitaj de la ministerio pri kulturo.

1.7. Internacia Kongresa Universitato (WDS)
La programo akceptiĝis de UEA-estraro. Ĝi okazos kiel en la pasinteco.

1.8. Ĝenerale (ES)

1.8.1. ES kontaktiĝis kun BRT (Belga Radio kaj Televido) kaj sukcesis pri "verŝajna" elsendo dum kaj/aŭ rilate al la kongreso.

1.8.2. Li faris liston de necesaj helpantoj antaŭ, dum kaj post la kongreso kaj ekster la kongresejo. La plenigadon de la nomoj li proponas poste. Jen io pristudota de ES DM RDS kaj JB.

1.8.3. ES klopodis akiri helpon de la Skolta Movado, sed malsukcesis ĉar tiu movado apenaŭ ankoraŭ ekzistas en Belgio.

1.8.4. Infana Kongreseto : Ni disponas pri bona estrino : Marie Grela.
Ŝi jam vizitis la kongresejon en Keerbergen kaj ensendis siajn proponojn.
Laŭ DM la perspektivo tiurilata ne estas malbona.

1.8.5. Al la Honora Komitato kromaliĝis D-ron H. Brugman, emerita Rektoro de "Europa College" el Bruĝo.
La listo nun estas kompletigota.

1.8.6. ES kunigis kiel eble plej multe da dokumentoj rilate al la du antaŭaj Antverpenaj kongresoj (1911 kaj 1928).
Li proponas krei panelojn kun la plej gravaj dokumentoj kaj ekspozicii ilin dum la kongreso, se eble en la akceptejo.

2. Invitleteroj al ŝtataj reprezentantoj :
Al la solena inaŭguro estos invitataj la ŝtataj reprezentantoj (ambasadoroj ks)
Projekto de letero estas amendumata kaj aprobita.
Decidiĝas akompanigi la invitleterojn de franclingva traduko.

3. Nomoj por salonoj :
Parto de la salonoj en la kongresejo jam havas nomon. JB informiĝos ĉu estos permesite ŝanĝi ilin. Se jes, LKK decidos pri la nomoj uzotaj. Se ne, LKK aljuĝos nomon al tiuj salonoj, kiuj ankoraŭ ne havas nomon.

4. EUROPCAR

EUROPCAR konsentas pri rabato de siaj prezoj je 25 %, el kiuj 15 % por la mendonta kongresano kaj 10 % por la kongreso.
EUROPCAR metos (reklam)-budon en la kongresejo. Jam estas agentejo en la flughaveno de Zaventem.
La kontraktpropono farita de DM al EUROPCAR estas aprobita de UEA-estraro. Same faras LKK.

5. Fotoservo
Interese estus havi profesian fotografiston por fari la oficialajn fotojn, preferinde esperantiston, kiu ja pli bone konas la oficialulojn kaj tiel povos eviti senutilajn fotojn.
Krome estas dezirinde disponi pri foto-servo, kiu povus prizorgi fotadon, riveladon, vendadon kaj pri eventuala servo por foto-ŝatantaj kongresanoj.
JB esploros la eblecojn sur tiu tereno.

5-bis : Fotado dum la kunsidoj
Ja ĉiuj komitatanoj konsentas pri la ĝeno kaŭzata ĝenerale de personoj kiuj trakuras la salonon, ĉefe dum la solena inaŭguro aŭ dum artaj prezentadoj por foti. Preferinde estus malpermesi tiujn fotadojn, sed ja ne ĉiam eblas tion realigi.
Almenaŭ "fulmado" devus esti nepre malpermesata.
Eblas kompreneble, ke jam la estraro de Zoologia Ĝardeno malpermesas fotadon. Tiam la afero estos solvita de si mem. JB informiĝos pri la eblecoj/devoj.

6. Dumkongresa sonregistrado :
Normale okupiĝas pri tio la Magnetofona servo de UEA. LKK tamen devas decidi kiel aranĝi tion.
ES proponas prepari "varban demandilon".

7. Trejnado de ekskursgvidontoj
PDS volas ricevi liston de ĉiuj sin proponintaj ekskursgvidontoj. Li intencas fari kun ili la planitajn ekskursojn.

8. Diversaĵoj .
8.1. EP proponas serion da bildkartoj pri Antverpeno kun Esperantoteksto.
La prezo estos po BF 6,-
8.2. RDS proponas kelkajn turismajn faldfoliojn por la UK-dokumentujo.
8.3. Rilate al faldfolioj, DM atentigas ke :
- turismaj faldfolioj estos senpage enmetitaj
- komercaj ne.
Principe UEA-estraro akceptas nur Esperant-lingvajn foliojn.
Aliaj estos priekzamenataj.

Fino de la kunsido : 17.30 h.



Kunsido de vendredo 14-a de majo 1982 en Kalmthout.

Ĉeestantoj : E. Symoens, A. Tilmont, E. Kehlet, D. Masterman, P. De Smedt, F. Luyten, J. Bovendeerd, W. De Smet, R. De Schepper, L. De Sutter E. Boehm.

Malfermo : 19.00 h.

1. Raportado

1.1.1. DM opinias, ke necesas malmendi ĉambrojn el kategorio A.
1.1.2. Nun estas periodo de amasa ensendo de aliĝiloj kaj mendiloj, eĉ tro por la kapacito de Centra Oficejo.

1.1.3. Arta Programo
1.1.3.1. ES atentigas pri tio, ke la Turisma Servo de la urbo petis urĝan alsendon de la kongres-programo.
1.1.3.2. Laŭ DM estas manko de homfortoj. Li petas al ĉiuj helpi al la novaj estrinoj de la arta programo (Hilde Van Ingelgem-Van Driessche, Arbeidstraat 21, 9300 Aalst kaj Trees Dooms, Kerkstraat 1, 2780 St. Gillis) Efektive, Jo Haazen rezignis pri tiu posteno.

1.2. PDS. Ekskursoj
1.2.1. Li faros resumon de tio, kion li jam havas.
1.2.2. Li proponis tut-tagajn ekskursojn al diversaj urboj. UEA tamen akceptis nur duon-tagajn, kvankam certaj estas duon-tagaj laŭnome, sed en realo tut-tagaj.
1.2.3. Certaj sin proponintaj ekskursgvidontoj plendis pro tio, ke oni enprogramigis ne la tutan de ili proponitaĵojn. PDS klarigis al ili, ke tutsimple ne eblas realigi ĉion proponitan.
1.2.4. Certaj gvidontoj ankaŭ jam senpacienciĝas.
1.2.5. PDS kontaktiĝos kun aŭtobusentreprenoj por priesplori la eblecojn.

1.3. FL - Filatelaĵoj
1.3.1. Ĉio funkcias laŭplane. La antaŭvendo bone progresas.
1.3.2. Laŭ RDS la buĝetitaj kostoj malpliiĝas. Oni jam ricevis antaŭmendojn : 2000 kovertoj, 2000 kartoj.
1.3.3. RDS invitos kiel eble plej multe da grupoj el la FEL- kaj BEF-organigramoj
1.3.4. DM opinias, ke ni devas reklami pri la ekspozicio. Li mem jam mendis 1/4-paĝan reklamon en ESPERANTO.

1.4. JB - Kongresejo k.s.
1.4.1. JB ricevis telefonadon de Roger SAELS el Meĥleno, ke li urĝe kontaktiĝu kun BRT-Mondelsendoj, kiu volus elsendi programon pri la UK, sed en la angla lingvo.
DM pretas fari tion. JB telefonos al BRT por anonci DM.

Intertempe la intervjuo jam okazis je mardo 25 05 kaj elsendiĝis je merkredo 26 05. JB surbendigis ĝin.

1.4.2.1. Pcŝta servo : Membro de ESPERANTO MORTSEL, kiu laboras ĉe la Poŝto, estas preta deĵori dum la kongreso. Tamen, la permeso estas nur por du tagoj. Se ni volas tutsemajnan servon, ni devos enŝalti politik-isto(j)n. ES petos S-ron PIOT prizorgi tion.

Temas pri : Lieven VAN DEN BRANDE, H. Consciencelaan 11, 2510 MORTSEL tel.: 031/40 48 68

1.4.3.1. Fotoservo : Okaze de la 3-landa Rekontiĝo en Heerlen (Nl) JB renkontis S-ron W. Grela (edzo de la Infankongres-estrino), kiu estas profesoro pri foto-arto en Lieĝa lernejo. Li pretas respondeci kaj prizorgi la fotoservon profite al la kongreso.

Tamen, intertempe alvenis letero de W. Grela, laŭ kiu li ne povos okupiĝi pri tio.

1.4.4. Kiel komisiite, JB vizitis la Zoologian Ĝardenon (S-ro Tampere) akompanate de Gerd Jacques.

1.4.4.1. La ejojn ni povos okupi ekde 23 07.1982. Tamen, ne estos problemo se ni jam ekde 22 07 alportas materialojn ktp.

1.4.4.2. Ne ekzistas "Unua Helpo ĉe Akcidentoj" (EHBO) en la Z.Ĝ., nur skatolo kun la minimumaj necesaĵoj.

Gerd Jacques zorgos por la aranĝo de UHA

1.4.4.3. Asekuro : Z.Ĝ. estas asekurita kontraŭ incendio k.s. Ni devos zorgi pri asekuro de nia Civila Respondeco kaj pri niaj propraj aferoj. JB, kiu laboras en asekur-agentejo, informiĝis pri la eblecoj.

Jen ili : Civila Respondeco de la organizantoj :

- korpa damaĝo : BF 50.000.000,-
- materia damaĝo : BF 5.000.000,-

premio : BF 5.000,-

Propra materialo (libroj, iloj ktp.)

- por BF 2.000.000,- premio : BF 7.000,-

kovrataj estas : incendio

ŝtelo kaj akvodamaĝo.

totala premio : 12.000,-

========

DM proponas komisii JB trovi taŭgan asekuron por maksimume BF 15.000,-

Okaze de vizito al Z.Ĝ. je 25 05, S-ro Tampere atentigis nin pri tio, ke asekuro de Civila Respondeco fakte ne estas necesa. Normale, tia asekuro kovras nur la respondecon de la organizantoj pro organizaj eraroj kaj ne la individuan respondecon de la parto-prenantoj. Pli bone, ni do direktu nin al asekuro de niaj propraj kongresajmaterialoj k.s.



1.4.4.4. Aparatoj : Ĉiu salono havas ekranon + projekciaparaton, ĉu por filmo, ĉu por lumbildoj. Nur retroprojekciilo ne estas.

Tiurilate JB informiĝis ĉe 3M. Tie retroprojekciiloj (overhead) estas lueblaj por po BF 850,- tage.

Same JB informiĝis ĉe la ministerio pri kulturo. Tie la servo, starig-ita antaŭ kelkaj jaroj, estas nuligita pere de ministra dekreto. Nun ekzistas alia servo KLANK EN BEELD (Son- kaj Bildservo).

Tie tamen retroprojekciiloj ne plu haveblas.

1.4.4.5. DM proponas komisii JB zorgi por retroprojekciilo dum unu semajno je maksimuma prezo de BF 4.250,- (5 X 850)

1.4.4.6. Fotado estas libera. Pri eventualaj limigoj decidu LKK.

1.4.4.7. Nomoj de la salonoj : estas libere ŝanĝeblaj. Sufiĉas surglui la ekzist-antajn nomŝildojn.

1.4.5. Akceptejo :

1.4.5.1. Ni sciigu al S-ro Tampere tion, kion ni bezonas kaj li zorgos pri tio. Ĉio necesa estas sur-loke : tabloj, tabuloj, ktp.

1.4.6. Ejoj :

1.4.6.1. La granda Esperanto-flago estas facile fiksebla sur la tuta profundeco de la podio en Salono Elizabeth.

1.4.6.2. La enirejo ŝajne estas ĉiam ornamata.

1.4.6.3. Eblos meti faskon da flagoj en la enirejo.

Proponiĝas meti unu urban flagon kaj plurajn Esperantajn.

1.4.6.4. La klasĉambroj enhavas la necesan materialon (ekranon, tabulon) Tamen unu el la klasĉambroj ne enhavas seĝojn, sed benkojn.

1.4.7. Restoracio/Trinkejo

1.4.7.1. S-ro Tampere proponas aranĝi le Foyer kiel "kongresa restoracio/trink-ejo" alirebla nur al la kongresanoj. Plie, dum la manĝo-horoj estos organizita mem-serv-restoracio en la "Foyer" kaj la restoraciejo.

1.4.7.1.2. Trinkaĵoj dum la estrar- kaj komitatkunsidoj neniel kaŭzas problemojn, ĉar ja la marmora ĉambro estas tut-apude de "Foyer". Se necese, oni povas meti sonorileton aŭ zumilon por voki la kelneron. Ankaŭ eblas meti slipetojn je la dispono de la kunsidontoj.

1.4.7.1.3. Panbulkoj povos esti servitaj se menditaj antaŭe.

1.4.7.2. La menuo kaj prezlistoj povos esti tradukitaj en Esperanto. S-ro Tampere promesis havigi ekzempleron al JB por tradukado.

1.4.7.3. Vendredo 23 07 82 : konsentite por : aperitivo je 12.00 h.
tagmanĝo je 12.30 h.
same por la vespermanĝo.

1.4.7.4. Festeto je sabato 31-a de julio por la deĵorintoj estos ebla .. sed .. ne senpage, almenaŭ pri tio ne povas respondi S-ro Tampere. Se ni volas, ke ĝi estu je kostoj de Z.Ĝ., LKK devas sin direkti al la direktoraro. S-ro Tampere forte dubas pri tio, konsiderante la interesajn prezojn kiujn ni jam ricevis, ekz. tutsemajnan abonon al la Z.Ĝ. por ĉiu kongresisto por nur duona tag-tarifo.

1.4.7.5. Ekzistas fridujo kaj kafmaŝino en "Foyer" je nia dispono. Ili tamen ne povas esti translokigitaj al alia loko. Tamen la distancoj estas tiel malgrandaj, ke tio ne povos kaŭzi problemojn.

1.4. 7.7. Por la lumoj ktp zorgos la Z.Ĝ.-personaro. Tio tamen dependas de la instalaĵoj. Se temas nur pri simpla en- kaj elŝaltado de lumoj, jam ne estos malfacilaĵoj.

1.4.8. Rekonebleco de la deĵorontoj

1.4.8.1. JB proponas malgrandajn helkolorajn butonojn en la ĉemiz-kolumo aŭ specialan pinglon, de malproksime rekoneblajn. Li ne ŝatas aĵojn kiel kravatojn aŭ koltukojn, ĉar ĉe varma vetero ili estus formetitaj.

1.4.8.2. Decidiĝas uzi helbluajn brakrubandojn.

1.5. WDS - IKU : nenio speciala.

1.6. LDS - Fervojista servo

1.6.1.1. Tri fervojistoj deĵoros la du unuajn tagojn en la Centra Stacidomo, poste en la kongresjo.

1.6.1.2. LDS demandas ĉu tiuj fervojistoj devos pagi la kongreskotizon. Jen tikla demando, ĉar ĝis nun ĉiuj helpontaj kaj eĉ kelkaj LKK-anoj pagis la kongreskotizon.

1.6.1.3. PDS: ekstremkaze, ke por "deĵori" ili ne pagu, sed se ili volas partopreni kongres-erojn, ili jes pagu eventualan unutagan kotizon.

1.6.1.4. DM atentigas pri tio, ke LKK decidu pri eventuala rekompenco al meritplenaj deĵorantoj, sed ĉu eblas decidi pri tio antaŭe ?

1.6.1.5. Tiu ĉi punkto do restas ne-solvita.

1.7. RDS - Loĝiga servo
Ŝajnas ke Esperanto-Centro Paderborn havas ankoraŭ kvanton da litoj disponeblaj.

1.8. EB - Kasisto :
EB ricevis BF 10.000,- de ASLK, sed ne scias kial. Laŭ ES temas pri reklamo.



1.8. La mendiloj por la bankedo estu senditaj al DM.
La kurzo de la BF estu 0,06 gld.

1.9. AT. Informado k.s.

1.9.1. AT demandas ĉu ŝi devas daŭrigi la serĉadon de dokumentujoj. DM raportas ke la firmaoj ankoraŭ ne respondis favore. La afero ŝajnas tro multekosta.
Ni povus mem aĉeti materialon kaj peti de firmaoj reklami sur ĝi.

1.10. ES. Ĝenerale :

1.10.1. ES forsendis 119 leterojn al ambasadejoj.

1.10.2. Je 05 05 okazis gazetara konferenco, kiun partoprenis 10-o da ĵurnalistoj de gazetoj, revuoj, radio.
Franclingva konferenco sekvos en Bruselo.

1.10.3. Infankongreseto
La kostoj sumiĝos je ± 9000 BF en rilato kun la kongresejo.

1.10.4. Jo Haazen sendis leteron por anonci sian rezignon pri ia ajn respondeco rilate al la arta programo.

1.10.5. Mapoj de la urbo ne ekzistas en Esperanto. Cetere la mapoj ne estos senpagaj.
Laŭ DM EUROPCAR estus preta donaci mapojn por la dokumentujo.

1.10.6. La urba turisma servo urĝe petas la kongresprogramon.
JB, kiu ĉiukaze havigu la programon al Z.Ĝ., havigos kopion al ES k. RDS.

1.10.7. Heroldo de Esperanto prizorgos la Kongresan Kurieron ĉiutagan. Tamen ili bezonos kompostejon. ES proponas klopodi akiri kelkajn ejojn en la urba lernejo en Quellinstrato.
EK Priekzamenos la kontrakton UEA/HdE

1.10.8. El Hinda Unio venis peto akcepti diplomatinon (Esperantistinon) kaj loĝigi ŝin.
Jen io tro multekosta.
DM proponas peti de la Hinda Ambasadoro sendi ŝin kiel diplomata reprezentantino.

2. Lerneja tago.
La programo aperos en la kongreslibro.

3. Kongrespartopreno + Loĝigo de la estraranoj kostos pli malpli 50.000 BF.
Ĉu la kongreso pagu tiujn kostojn ?
Voĉdono rezultas en : 3 kontraŭaj voĉoj kaj 5 sindetenoj.

4. Garantia kapitalo :
Mankas ankoraŭ ± 3000 guldenoj.

RDS klopodos trovi la necesajn promesojn de po 25 guldenoj.

5. El Pollando edzparo volas ekspozicii keramikaĵojn kaj lasi 1/2 de la vendoĝajno al la kongreso.
Konsentite.

6. "Reĝo Parzival" volas partopreni la kongreson.
Ĉiu malkonsentas.

7. La balo verŝajne devos okazi en'Crest Hotel'. RDS informiĝos pri la eblecoj.

8. Akceptoj :

8.1. En la provincestra akcepto povos partopreni nur 50 personoj.
Ili estos kiel eble plej diversnaciaj.

8.2. La urbestran akcepton povos partopreni 150 personoj.

Fino : 01.00 h.

Venonta kunsido : sabato 05 06 1982 en Esperantodomo, Antverpeno.

-------------

## K O N G R E S - P R O G R A M O

Vendredon 23 07

09.00 - 10.00 h. : Estrar- + LKK-kunsido
10.00 - 12.00 h. : Komitatkunsido
12.00 - 13.30 h. Komitata lunĉo.
13.45 - 15.30 h. Komisiono pri Informado
" " Planado
" " Elektoj
" " Kongresoj
15.45.-17.45 h. " " Edukado
" " Kontrolo de Landa Agado
" " Financoj kaj Administrado
" " Virina agado
18.00 - 20.00 h. Kultura Agado
Ĝenerala Regularo
Landa Agado
Eksteraj Rilatoj
20.00 - 23.00 h. Komuna Komitata Vespermanĝo kun UEA-prezidanto.



Sabaton 24 07

08.00 - 09.00 h. Organizado de la Kongresa Temo
09.00 - 10.15 h. Komisiono pri IKU
" " Semajno de Internacia Amikeco
" " Ĝenerala Regularo
" " Faka Agado
10.00 - 12.15 h. Nederlanda eksprese
11.00 - 12.15 h. Kunsido de CED
Komisiono pri Virina Agado
14.00 - 16.45 h. Nederlanda eksprese
14.00 - 19.00 h. Komitata kunsido
20.00 - 24.00 h. Interkona vespero.

Dimanĉon 25 07

08.00 - 09.00 h. Estraro kun LKK
09.15 - 10.00 h. Akcepto de la diplomatoj
10.00 - 12.00 h. Inaŭguro
12.15 - 13.45 h. Estraro de UEA
14.00 - 16.00 h. Malfermo
16.30 - 17.00 h. IKU-inaŭguro
17.00 - 18.00 h. Di-servo
20.00 - 22.00 h. Nacia vespero

Lundon 26.07

08.00 - 09.00 h; Estraro + LKK
Org. Kongresa temo
09.00 - 10.00 h. IKU
09.00 - 10.30 h. KEL
Kom. pri Informado
Asembleo de Fakaj Asocioj
Kom. pri Eksteraj Rilatoj
Kom. pri Kongresoj
10.00 - 11.30 h. Teatraĵo
10.45 - 11.30 h. IKU
11.00 - 12.30 h. Kontrolkomisiono de Landaj Asocioj
Kom. pri Edukado
Kom. pri Jubilea Jaro 1987
11.00 - 13.00 h. Esperantologia Konferenco
EGLI
BLE

14.00 - 16.30 h. : 1-a ĝenerala kunsido
14.30 - 16.30 h. : Teatraĵo
17.00 - 18.30 h. : Publika kunsido Regiona Agado
" " Virina Agado
17.00 - 19.00 h. : Esperantologia Konferenco
CSEH
ILERA
Konversaciaj rondoj
19.30 - 20.00 h. : Akcepto Societo Zamenjof
20.00 - 22.30 h. : Bankedo

Mardon 27 07

08.00 - 09.00 h. : Estraro/LKK
Org. Kongresa temo
09.00 - 10.30 h. : Kongresa Temo
BEL
Kom. IKU
Kunsido CED
Landa Agado
09.00 - 11.00 h. : IKUE
Prog. Kurso
UMEA
SEL
10.00 - 10.45 h. : Akcepto Eŭropaj Funkciuloj
10.00 - 11.30 h. : Teatraĵo
11.00 - 12.30 h. : MEM
ISAE
11.30 - 12.30 h. : IKU
11.30 - 13.00 h. : Kom. Jubilea Jaro
Kom. Elektoj
Kom. Kultura Agado
14.00 - 15.00 h. : IKU
14.00 - 15.30 h. : Kongresa Temo
Faka Agado
14.00 - 16.00 h. : Konversaciaj rondoj
15.15 - 16.45 h. : IKEL
15.15 - 17.00 h. : Sporta Agado
16.00 - 18.00 h. : Belartaj Konkursoj
17.00 - 18.30 h. : IPTEA
Org. Kongresa Temo



17.00 - 19.00 h. : IKUE / KELI
MT
ELF / AREK
CSEH
18.30 - 20.00 h. : Akcepto Urbestro
20.00 - 24.00 h. : Balo

Ĵaŭdon 29 07

08.00 - 09.00 h. : Estraro / LKK
09.00 - 10.30 h. : Kongresa Temo
Junulara Debato
LSG
Eŭropa Unio
Inst. Hodler
09.00 - 11.00 h. : UALE
09.00 - 12.00 h. : Tago de la Lernejo
10.30 - 13.00 h. : Komitato
10.45 - 11.45 h. : IKU
11.00 - 12.30 h. : Kongresaj Rezolucioj
11.00 - 13.00 h. : VEK
12.00 - 13.00 h. : IKU
13.00 - 14.30 h. : Estraro UEA / TEJO
13.30 - 17.30 h. : Tago de la Lernejo
14.00 - 15.30 h. : Delegita Reto
Kom. Planado
Kongresaj Rezolucioj
14.00 - 16.00 h. : IFEF
15.00 - 16.30 h. : Publika Kunsido UN k. UNESKO
15.00 - 17.00 h. : ORE
16.00 - 18.00 h. : Akcepto ĉe Provincestro
17.00 - 18.30 h. : Aŭkcio
17.00 - 19.00 h. : CSEH
20.00 - 22.00 h. : Muzika Vespero
21.00 - 24.00 h. : Junulara Vespero

Vendredon 30.07

08.00 - 09.00 h. : Estraro / LKK
09.00 - 10.00 h. : IKU
MEL
09.00 - 11.00 h. : ILEF
Prog. Kurso
GEI - ekzameno

09.00 - 12.30 h. : Komitato
10.00 - 12.00 h. : Teatrajo
10.30 - 12.30 h. : IKU
11.00 - 12.30 h. : TEJO
11.30 - 13.00 h. : INOE
12.00 - 13.00 h. : IKU
LIBE
TEVA
13.00 - 14.00 h. : Estraro / LKK Budapešto
14.00 - 16.00 h. : 2-a ĝenerala kunsido
Prog. Kurso
Konversaciaj rondoj
14.30 - 16.30 h. : Teatrajo
16.00 - 18.00 h. : Akademio
16.30 - 18.00 h. : CED
Junulara Debato
16.30 - 18.30 h. : Estontaj UK-oj
17.00 - 19.00 h. : CSEH
IKEL
20.00 - 22.00 h. : Teatrajo

Sabaton 31 07

08.00 - 09.00 h. : Estraro / LKK
09.00 - 10.00 h. : Komitato
10.00 - 12.00 h. : Fermo
12.00 - 13.00 h. : Estraro de UEA

---

## ĜENERALAJ KOMUNIKOJ

ESPERANTO AALST - NOVA ESTRARO

Prezidanto : Petro DESMEDT, Hemelstraat 44, 9330 DENDERMONDE 052/21 26 77
Vic-prezidanto : Raymond STEENHOUDT, Pamelstraat 296, 9400 NINOVE
Sekretario : Erik D'HONDT, WIlgstraat 25 A, 9440 EREMBODEGEM 053/77 44 97
Kasisto : Maurice DE WIT, Ninovestraat 157, 9440 EREMBODEGEM
Membroj : Clement AMANT, Brakelstraat 52, 9300 AALST
Hugo DOSSCHE, Asserensdries 103, 9300 AALST

FLEJA - ESTRARO

Prezidanto : Kristin TYTGAT, St. Hathebrandstraat, 8 2510 MORTSEL 031/49 50 24
Sekretario : J.P. VANDENDAELE, Stationsstraat 1A 8380 LISSEWEGE 050/54 62 49
Kasisto : Ite TYTGAT, Van Leriusstraat 48, 2000 ANTWERPEN
Administranto : Gerd JACQUES, p/a Esperanto Centro.

---